

Interŝanĝe  
 Exchange — En échange  
 Austausch — Egz. wymienny

# ĈIELARKA STANDARDO


INTERNACIA KOOPERATIVA GAZETO

1-a Jaro

Novembro—Decembro 1936.

Nr. 4/5.

## MEMORE AL LA JUSTAJ PIONIROJ DE ROCDEL



La 21-an de Decembro 1844 la 28 teksistaj laboristoj de la angla urbo Rochdale malfermis — ne la unuan en la historio, sed la unuan historian, socian vendejon de konsum-kooperativo, kiu fariĝis pro sia modela gvidado la ĝermo el kiu naskiĝis la tuta centmilion-membra kooperativa movado de konsumantoj en la tuta mondo. Honorigante ilian noblan memoron okaze de la 92-jara datreveno en nia unua esperant-kooperativa gazeto, ni presigas tiun-ĉi bildon, prezentanta:

Maldekstre la unuan butikon en luita dometaĉo en la „Buŝa-Strato“, dekstre la hodiaŭan Centrejon de la sama kooperativo, havanta nun 90 butikojn, malsupre — la 5 ĉefaj gvidantoj el- inter la 28 fondintoj. (Kliŝo el la pola „Juna Kooperativisto“).

## NIAJ ORGANIZAJ AFEROJ

Jen ni transdonas en la manojn de niaj legantoj la Nr. 415 de nia unua internacia kooperativa organo esperantlingva, esperante, ke ĝi same al la antaŭaj, trovos ilian plenan aprobon. El ĝi vi vidos ke ni ĉiam pli bone progresas: en la unua Nr. estis nur unu pli grava korespondajo de alilando, en la dua — jam tre seriozaj artikoloj de respondecaj kooperativaj oficistoj en kvar diversaj landoj, en la nuna — krom tio jam artikoloj de landaj gvidantoj de kooperativa movado, simpatiantaj kun la ideo de helpa lingvo en la internaciaj kooperativaj rilatoj.

Ce tiu okazo ni deziras tuŝi ankoraŭ kelkajn el la plej gravaj organizaj aferoj, je kies atenta tralego kaj laŭebleca realigo en la vivo ni tre petas nian ŝatatan legantaron kaj amikaron:

Ni troviĝas en **o r g a n i z a** agadperiodo. Pro tio la moralaj devoj de ĉiu, kiu renkontiĝas pli intime kun nia gazeto, estas pli grandaj ol kutime; ili postulas **l a b o r o n** kaj **k u n l a b o r o n**, por krei ion novan, por atingi la komunan celon. Do — la eksento de certa devo, de certa ofero, certa laboro por ideo — estas la unua punkto priatentenda.

La nombro de personoj, kiuj turnis sin al ni kun la peto je alsendo de provekzemplero de „Ĉielarka Standardo“, jam trapasis la ciferon de 400, inter kiuj troviĝis pli ol 200 veraj kooperativanoj, pli aŭ malpli aktivaj membroj de diversfakaj kooperaj entreprenoj el ĉ. 30 landoj. Al ili ĉiuj ni sendas ankoraŭ senpage por disvastigo tiun-ĉi numeron, (la sekvonta — sesa — estos sendata nur al abonintoj), sed ni tre insiste petas:

1. La kooperativanoj — esperantistoj aŭ simpatiuloj de kooperado, kiuj deziras esti presataj en la

### „INTERNACIA ADRESARO DE KOOPERATIVANOJ + ESPERANTISTOJ“

ke ili nepre krom sia detala adreso sendu al la Redakcio la informon pri: aĝo, profesio, event. socia posteno, interesiĝo, fako de ilia socia laboro kaj aliaj indikoj, kiuj povas pliriĉigi la informan valoron de nia Adresaro, presota bildaŭ kiel „Aldono“ al „Ĉielarka Standardo“.

Se ĝis fino de marto 1937, ni ne ricevos pli da indikoj personaj, ni presigos en la „Adresaro“ nur la nomojn de tiuj, kiuj indikis en sia korespondajo, ke ili estas kooperanoj aŭ interesiĝas pri tiu movado. Se iu ne dezirus esti presata, li bonvolu informi nin pri tio.

2. La ne-kooperativanoj bonvolu ekinteresiĝi pri nia organo la konatajn lokajn kooperativanojn, kooperajn organizojn de sia loko, regiono aŭ lando, gvidantojn de tiu movado en ilia loko, regiono aŭ lando, instigi ilin al kunlaboro kun ni, oferante sian helpon kiel peranto, tra dukanto k. t. p. (La samo koncernas nature des pli la koop. — esperantistojn).

3. Ĉ i u j n, ke ili bonvolu ekaboni la gazeton, memorante ke:

Gian eldonon entreprenis, la kostojn de presado kaj dissendo garantiis por la tuta jaro kooperativa institucio ne-esperantista ne por profito, sed pro simpatio al esperanta ideo, por disvastigo de kooperatismo en esperantaj medioj kaj por enkonduko de Esperanto en la tutmondan kooperativan movadon. Tiu ideeco ne povas resti sen respondo flanke de ni — kooperativanoj — esperantistoj de ĉiuj landoj. Gi alvokas nin, ke ankaŭ ni niaflanke alportu brikon al tiu nova konstruaĵo, ke ni starigu la gazeton sur tia financa bazo, ke ĝi baldaŭ fariĝu memstara. Se troviĝis en tiom da landoj tiom da fervoraj kunlaborantoj, devas troviĝi ankaŭ sufiĉa nombro da abonantoj. Por — ke la gazeto estu memstara, ne sufiĉas la hodiaŭaj kelk — dekoj da abonantoj, necesas almenaŭ kelkcent.

La ideocon de „Spólnota Pracy“ ni devas subteni ĉiuflanke per propagando de la gazeto, precipe tamen:

- en nacia kooperativa gazetaro de sia lando,
- en esperanta gazetaro de sia lando,
- en esperanto - kaj kooperativ amika gazetaro de sia lando.
- en sia faka, kleriga, politika k. s. gazetaro,

laŭ „Indikoj“ presataj en la Nr. 2/3 de „Ĉielarko“, el kiuj ni ripetas tie-ĉi la plej ĉefajn:

1. Ĉ i u j n artikolojn de „Ĉielarko“ oni povas sen peto je permeso represi originale aŭ en nacilingva traduko en kiu-ajn gazeto aŭ alia eldonaĵo, nur kondiĉe de fina mencio: „El „Ĉielarko Standardo — Internacia Kooperativa Gazeto“ kaj alsendo de 2 provekzemperoj al la Redakcio.

2. Tre grave estas, ke oni presigu en tiu gazetaro la jam pretajn menciojn pri nia organo, aldonatajn al ĉiu Nro de „Ĉ. St.“ en kvar lingvoj.

3. Tre gravan rolon ludas en la propaganda laboro la t. n. esperanto — amikaj gazetoj, t. e. gazetoj, enhavantaj konstantan aŭ de temp'-al-tempo angulon, rubrikon aŭ kronikon pri — aŭ per — esperantan. Bonvolu indiki al ni la adresojn de tiaj gazetoj el via lando, por-ke ni povu sendi al ili provekzempleron de nia gazeto.

4. Plua tre grava helpo al la Redakcio konsistas en tio, ke vi sendu al ni: artikolojn pri la nuna stato de kooperativa movado en via lando, kronikojn pri la plej novaj aktualaĵoj, fotojn kaj bildojn, recenzojn de originalaj vialandaj kooperativaj libroj kaj broŝuroj kaj — enhavon de via nacilingva kooperativa gazetaro, se ĝi enhavas artikolojn interesajn por la tuta mondo.

5. Fine — oni ne devas forgesi pri neceso de organizo de Esperanto-Kursoj ĉe la kooperativaj organizoj de via loko kaj pri la grupa korespondado kun similaj kursoj en aliaj landoj.

Se ĉion-ĉi vi faros laŭ via plej granda ebleco, tiam ni estos povantaj pensi pri pluj paŝoj al la venko — pri oficiala enkonduko de Esperanto en la kooperativan movadon.

LA REDAKCIA KOMITATO

## KIAMANIERE PAGI LA ABONON?

Jara abono al „Ĉielarko Standardo“ kostas: en Polio 6 zł. en aliaj landoj 9 zł. aŭ egalvaro, do: 7 svisaj frankoj (post devaluo), 7/6 anglaj ŝilingoj, 1½ da Usuna dolaro ktp. Oni povas aboni ankaŭ duon- kaj kvaronjare. Cetere — kiom vi sendos, tiom da N-roj proporcie ni ekspedos al vi, sciigante pri fino de abonperiodo.

Alsendo de mono povas okazi senpere per internacia poŝtmando al la eldonejo: „Spółnota Pracy“ Warszawa (Varsovio), str. Marszałkowska 149 (nova loĝejo!) aŭ al ĝia konto al la pola Poŝt-Sparkaso Nr. 17381 en Varsovio. Tiu Poŝt-Sparkaso havas en la sube cititaj landoj sian konton, do el tiuj landoj vi ne bezonas ekspedi la monon eksterlanden, sed pagi al via landa Poŝt-Sparkaso al jena konto: „Pocztowa Kasa Oszczędności“ (Pola Poŝt-Sparkaso): Aŭstrio — Wien Nr. 79.500, Belgio — Bruxelles Nr. 244.200, Ĉeĥoslovakio — Praha Nr. 89.600, Danlando — Kopenhago Nr. 14.972, Francio — Paris Nr. 60.012, Nederlando — Den Haag Nr. 145.510, Germanio — Berlin Nr. 11.000, kaj Svedio — Stockholm Nr. 4.312, ĉie sur la enpagilo dorsflanke indikante: „por „Spółnota Pracy“ Warszawa Nr. 17381“

Grand-Britianoj pagu nur al „Brita Esperanto-Asocio“, 142 High Holborne, LONDON, W C. 1.

Danlandanoj pagu al: Dansk Esperanto-Institut, C. Etlasvej 14, AABYHOJ, Danlando,

Francoj pagu al: Honoré Bourguignon, BESSE-sur-ISSOLE, Var, Francio

Islandanoj pagu al: Joh. G. Helgason, REYKJAVIK, Box 397, Islando,

Svedoj pagu al: Eric Fredin, Master Danielsgatan 5, MALMÖ, Svedio

kiuj transprenis landan reprezentantecon de „Ĉielarko Standardo“

El landoj, kie regas deviz-limigoj, oni sendu la abonpagon post interkonsento kun via centra banko aŭ pere de unu el „liberaj“ landoj. Unu jarabono eksterlanda samvaloras 16 respond-kuponoj, kiujn ni ankaŭ akceptas.

GRAVA

SCIIGO

La Loka Kongresa Komitato de 29-a Universala Jubilea Esperanto-Kongreso en Varsovio turnis sin al ĉiuj pollandaj Kooperativ-Asocioj kun propono je kunvoko de speciala Komitato, invitonta kaj gastonta ĉiujn kooperativanojn-esperantistojn, kiuj ĉeestos LA JUBILEAN. Laŭ ĝisnunaj personaj informoj — la estroj estas simpatiemaj al tiu propono. Oficiala komuniko baldaŭ sekvos.

# POR ESPERANTO EN KUNSOCIADO

Rimarko de la Redakcio: La aŭtoro de tiu artikolo, konforme al sia projekto kiun ni presas en la rubriko „Kiel ni devas nomi nin?“ — uzas la vorton „kunsociado“ anstataŭ „kooperativismo“

„Kunsociado estas ne laboro por la popolo, ne laboro inter la popolo, sed la laboro de la popolo mem“ — diris unu el plej merito-plenaj konstruintoj de konsumkooperativa movado en Polio — Romuald Mielczarski (legu Mjelčarski).

Tio estas ne nur vortsignalo, ne nur direktivo — tio estas la efektiva vivo, la realaĵo de la vivo mem. La kunsociado eliris ja el inter homoj simplaj, el fabriklaboristoj kaj kamparanoj. Inteligentularo ludis tie nur rolon de propagandantoj, poste de oficistoj. Klasoj posedantaj ne partoprenas ĝin preskaŭ tute. Tio estas komprenebla.

Pro tio en nenia movado oni trovas inter aliaj strangaj laborantoj kaj gvidantoj, estraranoj ktp. tiom da meminstruituloj, kiel en kunsociada movado. Ili lernis sian metion praktike, ili specialiĝis perfekte en sia laboro por sia laboro, kaj tiu laboro donis al ili pli da teoria scio ol oficiala lerneja studado.

Tio klarigas ankaŭ, kial kunsociada literaturo estas, proporcie al la larĝeco de la movado, malriĉa. Ĝia karaktero estas antaŭ ĉio propagandeca, populara, instrua kaj teknika. Verkoj pure sciencaj kaj filozofiaj estas nemultaj, literaturistaj — des pli.

Tio klarigas ankaŭ la fakton, kial tiu movado, esence internacia, (ne kosmopolita), havas relative la plej malfortajn internaciajn rilatojn. En la kunsociadaj internaciaj rilatoj partoprenas ĝis nun nur la plej altaj funkciuloj kaj specialistoj, laborantaj precipe en la centraj landaj Asocioj. La grandaj, vastaj amasoj de kunsociadanoj restas por ili tute fremdaj. Apartaj kunsociadanoj de unu lando tute ne interrilatas kun si, nek laborantoj de kunsociadejoj, nek estrarmembroj de lokaj kaj regionaj kunsociadejoj. Nur la estrarmembroj de Centraj Landaj Asocioj, kaj eĉ ili ne ĉiuj, unufoje dum tri jaroj renkontiĝas dum Internacia Kooperativa Kongreso aŭ escepte, dum ia eksterlanda ekskurso.

Dume — se ni konsideras, kion povus doni senpera interrilato de angla aŭ belga konsumvendejo kun simila malpli evoluigita — pola aŭ ukraina. Kiom multe povus profiti senpera kontakto de ekz. bulgara vilaĝano kun dana kunsociada laktejo. Kiel instruplenaj povus esti por la laboristo en Bukareŝto la studo de raportoj de la italaj labor-kunsociaĵoj aŭ historio de sveda kunsociada batalo kontraŭ la karteloj.

Bedaŭrinde. La lingvaj baroj fermas la trezore-

jon de universala kunsociada sperto por simplaj laboristoj kaj kamparanoj, ne sciantaj fremdajn lingvojn, kaj la kooperativanoj vivas pro tio en izoleco.

Tiun izolecon povas forigi nur Esperanto. Ĝi estas la lingvo, kiun oni povas ellerni en la daŭro de tri ĝis 6 monatoj perfekte. Nur ĝi povus malfermi al kunsociadanoj de la tuta mondo la tutajn de internacia kunsociada literaturo, instruilaro, praktika sperto en ĉiuj branĉoj de kunsociada vivo.

Pro tio ni starigas programon, por kies efektiva vigo ni ĉiuj devas kune labori:

1. Esperanto-kursoj kaj Esp-anguloj en ĉiuj kunsociadaj gazetoj de la mondo, aŭ almenaŭ en ĉiuj popularaj.
2. Esperanto-kursoj (buŝaj) ĉe ĉiuj klerigaj fakoj de kunsociadejoj
3. Tradukado de ĉefaj teoriuloj kaj praktikuloj de kunsociada movado.
4. Esperanta resumo de ĉiuj nacilingve eldonataj kunsociadaj libroj, broŝuroj kaj jarraportoj.
5. Esperanta eldono de „Internacia Kooperativa Revuo“ kaj de aliaj esence internaciaj eldonaĵoj.
6. Esperanto kiel oficiala traduklingvo dum internaciaj kunsociadaj Kongresoj, konferencoj ktp.

Kiu volas kontraŭstariĝi al tiuj justaj postuloj? Nur eble kelkaj konservemaj en lingva vidpunkto, poliglota gvidantoj. Sed ne la larĝa kunsociada popolamaso, kiu ne komprenas fremdajn lingvojn, ne havas tempon lerni ilin kaj ne volas lerni ilin, ĉar ili ja estas kelkcent. La kunsociadanoj havas pli konkretan kaj utilan laboron sur kampo ekonomia kaj kultur-kleriga, ol perdi tempon por studo de samsignifaj fremdaj sonoj. Ankaŭ la kunsociadanoj alvenos al la delonge de esperantistoj predikata devizo: propra nacia lingvo en propra lando, por la tuta eksterlando — nur unu helpa lingvo internacia — Esperanto.

Tiuj, kiuj kontraŭis tiun justan devizon, barus la progreson, malhelpus la senperan interrilatiĝon kaj interkonatiĝon de kunsociadanoj de ĉiuj landoj.

Enkonduko de Esperanto en la vivon de kunsociadanoj de ĉiuj landoj estas do vere unu el tre gravaj kaj aktualaj taskoj de nuntempa vivo.

Ni laboru por ĝin plenumi. La unuan paŝon ni faru dum la alvenanta JUBILEA ESPERANTO-KONGRESO en VARSOVIO.

*Adam Uziembło*

Estro de gazetara k. propaganda fako de L. K. K. de la Jubilea Universala Esperanto Kongreso en Varsovio, ul. Krzyckiego 11.

BOLESŁAW PRZEGALIŃSKI



1771 — † 1858

# R O B E R T O W E N

*De la Redakcio:* Ciam pli serioza aro de simpatiuoj al nia esp.koop. ideo pligrandigas la nombron de niaj kunlaborantoj. Jen artikolo, verkita de la nuna Direktoro de Scienca Kooperativa Instituto en Varsovio, S-ro B. Przegaliński, tradukita laŭ permeso de l'aŭtoro el la pollingva „Praktika Kooperativa Informanto“

Roberto Owen (legu Oŭen) naskiĝis en la jaro 1771 en la angla urbeto Newtown (Legu Njutaŭn), kie lia patro okupiĝis pri selist'kaj forĝista metio. La mizero en la hejmo — ĉar Roberto estis la dua plej maljuna el — inter la sep infanoj en la familio — devigas lin perlabori sian vivtenon jam komence de la deka jaro. Nur lia neordinara diligenteco kaj la denaskaj kapablecoj permesas al li fari „karieron“: de helpa knabo al kvalifikita laboristo, poste al specialisto en tekstila industrio, fine al direktoro de fabrikoj. Jam antaŭ la 30-jaro de sia aĝo li stabilizas sian situacion kiel kunposendanto kaj direktoro de kompanio, kiu en la jaro 1799 aĉetas la famajn ŝpinfabrikojn de la skota industriisto Dale (legu Dejl) en la industria loko New Lanark.

En tiu fabriko, kiun li persone reorganizas, Roberto Owen efektivas tutan vicon da teknikaj perfektigaĵoj, kaj la laboristojn, okupitajn en ĝi, li atente prizorgas, certigante al ili kiel eble plej bonajn labor-kaj vivkondiĉojn. En New Lanark kristaliĝas lia mondkoncepto pri la edukado de homoj. Lia nomo fariĝas fama. Al New Lanark alveturadas diversaj personoj el la tuta lando kaj el eksterlando, por ekkoni la spertojn tie-ĉi fariĝintajn. Dum la jaroj 1815 ĝis 1825 vizitis New Lanarkon pli ol 20.000 homoj. La amerikana vojaĝisto Griscom, notante la elportitajn el tie impresojn, rimarkas: „Mi dubas, ĉu en la tuta mondo povus trovi fabrika kolonio, en kiu oni povus trovi tian ordon, modelan administradon, pacon kaj bonstaton“.

En la vivo de Owen komenciĝas nova epoko, kiam li de la lokaj eksperimentoj transiras al

propagando de sia sistemo kaj de la akiritaj per ĝi efikoj. En la jaro 1813 li presigas sian unuan verkon sub la titolo: „Nova socia mondkoncepto aŭ pri la formiĝo de homa karaktero“. Li komencas postuli de la parlamento la decidon pri la labora leĝo, limigon de infanlaboro, malpliigon de laborhoroj k.t.p. Samtempe li batalas kun obstakloj, precipe kun la malfavoro de anglaj industriistoj, kontraŭstarantaj al la saĝa reformo de R. Owen.

Por efektiviĝi kompletan reformon de sociaj kondiĉoj, R. Owen propagandas la fondadon de industri-agrikulturaj komunumoj, laŭeble ekonomie memstaraj, kun 1 ĝis 3 mil da loĝantoj. Por realizi ilin, li multe agitas buŝe kaj skribe, multe vojaĝas, penante emigi al siaj ideoj alte starantajn personaĵojn kaj eĉ regantojn de diversaj landoj. En la jaro 1825 li fondas la unuan komunumon „Nova Harmonio“ (New Harmony) en Usono. Internaj kvereloj de la komunumomembroj kondukas tamen al disfalo de tiu komunumo, same kiel ĉe multaj aliaj, kiujn oni provis organizi en tiu lando.

Revenante al Anglio, R. Owen penas realizi alian ideon, celantan al reformo de komerco. Li volis forigi la profitojn de la perantoj per organizo de senpera rilato inter la produktanto kaj konsumanto. Tiucele li organizas en Londono en la jaro 1833 la „Justan Labor-Borso“ (orig. „Equitable Labor Exchange“). Tiu institucio akceptadis ĉiujn produktojn de l'laboro, pagante por ili per t. n. labor-bonoj, kiuj rajtigis la posedanton akiri alian produkton deponitan en la Borso. Tiu Borso daŭris ne pli ol du jarojn.

La lastan periodon de sia vivo Owen dediĉas al propagando de siaj ideoj, malgraŭ ke li malestigis al siaj eksperimentoj. Li eldonas multajn broŝurojn kaj librojn, el kiuj la plej grava estas: „Nova Morala Mondo“. Sub la sama titolo li komencas en la jaro 1834 eldonon de propra ga-

zeto. Li partoprenas la laborist-sindikatan movadon. En la jaro 1858 li mortis.

La gvida ideo de la Owen'a sistemo estis, ke la karaktero de l'homo estas nure la rezulto de edukado kaj medio, en kiu li vivas, do — ke sufiĉas ŝanĝi la eduk-sistemon kaj la medion, por formi novajn homojn. Montriĝis, ke tiu rezonado estis tro unuflanka. Same erara estis la konvinko, ke oni povas efektiviĝi sociajn reformojn tute desupre, sen la streĉo de la interesitoj mem.

R. Owen realizis relative malmulte el siaj kuraj ideoj, sed per sia severa kritiko de la rezultaj sociaj kaj ekonomiaj kondiĉoj, per siaj

reformemaj penadoj, lia influo montriĝis grandega.

„Oni povas diri — parolas pri li Karlo Gide — ke la solaj du grandaj socialaj eksperimentoj, kiuj efektiviĝis en tiu jarcento (vortoj skribitaj de Gide en la jaro 1896), ni ŝuldas al Robert Owen. La unua el ili estas la kooperativa movado, originanta de li, kiel tion deklaris la Roĉdelaj Pioniroj mem, dirante, ke ili agis sub la spirita influo de Owen. La dua eksperimento estas la laborista leĝdonado, t. e. ĉiuj leĝoj, traktantaj la defendon de la laboro, kiun Owen la unua aplikis en propraj fabrikoj, kaj kies leĝan ĝeneralligon por la tuta lando li alceladis“

## KELKAJ PENSOJ EL LA VERKOJ DE ROBERT OWEN

„La homo fariĝas sangavida sovaĝulo, hommanĝanto aŭ estaĵo tre civilizita kaj nobla depende de la cirkonstancoj, en kiuj li troviĝas de post sia naskiĝo“



„Kial la labor-tago devas esti pleje ok-hora? Ĉar:

1. Ĝi estas la plej longa tempo-daŭro, kiun homa estaĵo povas elteni sen malutilo al sia mensa kaj korpa sano kaj ankaŭ al sia feliĉo, konsiderante la mezan forton de l'homo kaj penante certigi la ekzisto-raĵon same al la fortaj kiel al malfortaj homoj.
2. Ĉar la jam faritaj eltrovaĵoj en kemio kaj mekaniko faras la neceson de pli longa korpa streĉo superflua.
5. Ĉar la vera intereso de ĉiuj postulas, ke ĉiuj estu sanaj, inteligentaj, kontentaj kaj riĉaj“



Ĉu oni devas forigi la maŝinojn kaj reveni al la antikvaj formoj de produktado? Ĉu oni devas oferi milionojn de homaj estaĵoj (al senlaboreco pro enkonduko de novaj maŝinoj)? Nek la unua nek la dua eventualaĵo devas okazi. La maŝino devas fariĝi helpo por la homo, ne lia persekutanto. Oni devas trovi por la senlaboruloj utilan laboron en alia branĉo, per kio la vendo-merkato plilarĝiĝos, kaj tio donos novajn labor-eblecojn“



„Por — ke la homa medio povu esti ŝanĝita je io pli bona, oni devas forigi la profiton. La ĉasado al profito — jen la plej granda malbono, jen la hereda peko, jen la malpermesita frukto, kiu kaŭzis la falon de homa raso. Profito signifas „surpluson“ ĉe la produkto-kostoj. Ĝi estas maljusto. Justa prezo estas tiu prezo, kiu respondas al la produkto-kostoj. La havaĵo devas esti vendata je tiu prezo, je kiu ĝi estis produktita. La profito estas ne nur maljusto, sed ankaŭ kaŭzo de krizoj. La profito malebligas al la laboranto akiri la produkton de sia laboro, do ĝi entute ne permesas la konsumandon de tio, kio estis produktita“



Nia sistemo povas esti adaptita ne nur al individuoj, sed ankaŭ al societoj (temas pri sistemo de adapto de produktado al konsumado — rim. de tradukinto). Ekzistas hodiaŭ 400 — 500 kooperativoj. Multaj el ili havas ian surpluson de varoj, kiun ilia regiono ne bezonas, kaj ili volonte enirus intersanĝajn interrilatojn kun aliaj societoj“



Ĉu mi ne ĉagrenas pro mia maltrafita vivo? Tute ne. Mia vivo ne trapasis sen utilo. Mi predikis gravajn verojn, kaj, se la mondo ne volis akcepti tiujn verojn, ĝi okazis pro tio, ke la mondo ne ekkomprenis ilin. Ĉu pro tio mi devas kulpiĝi ĝin? Mi antaŭeniris mian epokon“

Tradukis J. Z.

# KOOPERATIVA IDEO KAJ LA NUNTEMPA EKONOMIO

*Prelego de S-ro. Dr. Bernhard Jaeggi, Prezidanto de la Svisa Asocio de Konsum-kooperativoj, dirita dum la Kunveno de la Statistik-Ekonomia Societo en Basel la 23-an de Novembro 1936. Publikigita en la organo de la Asocio „Schweiz. Konsum-Verein“ Nr. 48/49 de 1936: laŭ permeso de l'aŭtoro, donita al la red. de „Cielarka Standardo“ — tradukis J. Z.*

Kiel temo por la hodiaŭa prelego mi elektis la problemon de „Kooperativa ideo kaj la nuntempa ekonomio“. Memkompreneble — estas neeble dum unu referato klarigi detale ĉiujn flankojn de la problemo. Mi do estas devigata limigi min je certa nombro de plej ĉefaj asertoj.

La kooperativoj estas hodiaŭ kritikataj de tri diversaj flankoj: La unuj prezentas ilin kiel kreaĵoj de marxista spirito, aliaj deklaras, ke ili estas etburĝaj entreprenoj, kaj certa nombro de homoj opinias, ke temas tie-ĉi pri organizaĵoj simple kapitalismaj. Ĉiuj tri opinioj estas maltrafaj.

## *Kio estas Kooperativo?*

Ni unue konstata, kiel tekstas la difino de kooperativoj-en la nove projektata svisa kooperativa leĝo. Jen ĝi:

*„Kooperativo estas uniĝo de nelimigita nombro de personoj aŭ komercsocietoj, organizata en komunecon, kiu ĉefe alcelas la disvolviĝon aŭ sekurigon de certaj ekonomiaj interesoj de siaj membroj“*

Kiaj estas la ideoj, kuŝantaj ĉe la bazo de tiu kooperativ-koncepto? Jen ili:

1. Kooperativo estas uniĝo de personoj, kontraŭe al la Akci-Societoj, en kiu la decidan rolon ludas certa, antaŭe difinita kapitalo (fondkapitalo), dividita en apartajn sumojn (akciojn),
2. Kooperativo alcelas la disvolvigon kaj sekurigon de la interesoj de siaj anoj, aŭ sur kampo de produktado kaj vendado, aŭ de l'aĉeto kaj konsumado.
3. Kooperativo estas organizo de reciproka memhelpo.

Kooperativoj — bazante sin sur supra leĝa difino — estas tre evolu-povaj kaj povas fari por siaj membroj sur ekonomia kampo eksterordi-

nare multe. Kion unu sola individuo ne estas povanta plenumi kaj atingi, tion povas fari a reŝgo per unu iĝo en kooperativo, laŭ la proverba rakonto pri la sep branĉoj, kiujn la patro kune ligis kaj al siaj filoj donis por rompi ilin. Ĝi ne estis ebla. Disligite — ĉiu branĉo aparte estas tamen facile rompebla. En tio ĝuste konsistas la granda ideo de kooperativismo, laŭ kiu multaj homoj ariĝas kune, por krei fortajn kaj por helpi al si reciproke per la ideo de memhelpo.

## Kiaj kooperativoj ekzistas en Svislando?


Laŭ la publikaĵo de la Svisa Komerca Registro ni havis en Svislando ĉe la fino de la jaro 1935 entute 11,807 kooperativojn, nome:

Kooperativoj de l'laboro kaj de produktado — 73, ĝeneralaj konsum — koop. — 638, agrikulturaj konsum — koop. — 235, specialaj konsum — koop. — 169, koop. restaŭracioj kaj manĝejoj 141, konstru-kaj loĝej — koop. kun publik-servava karaktero — 257, koop. por alkonduko de akvo — 433, elektro — kaj gaz — koop. — 314 (ekzemple la Koop. „Elektra Birseck kaj Baselland“), koop. por agrikultura aĉeto — 703, koop. de aĉeto de komercantoj, metiistoj kaj industriistoj — 112, koop. por produkto de fromaĝo — 2893, aliaj agrikulturaj ali — produkt — koop. — 208, ali — produkt — koop. de komercantoj, metiistoj kaj industriistoj — 172, koop. por plibonigo de grundo — 78, koop. por kulturado de brutaro — 1441, koop. de ĝenerala utileco — 358, paŝtej — koop. — 84, aĉet — kaj vendo — koop. 11, kredit — koop. laŭ sistemo Raiffeisen — 633, aliaj prunto — koop. — 26, ŝpar-koop. — 39, koop. de ŝparkasoj 102, koop. de asekuro por vivo, maljuneco, invalideco kaj la restintaj familianoj — 132, malsanul — kaj mortkas — koop. 462, koop. por asekuro de brutaro — 68, aliaj koop. por asekuro de havaĵo — 10, koop. por asekuro de havaĵo — valoro — 92, aliaj koop., precipe je produktiva karaktero — 1923, kune 11,807 kooperativoj.

De tiu listo ni vidas, ke la kooperativoj povas esti dividitaj en kvar grandaj grupoj: KOOP. DE PRODUKTADO, — DE PRODUKT-VENDADO, — DE AĈETO kaj DE KONSUMADO. Al la lastaj apartenas ankaŭ la kooperativoj, konstruantaj domojn, koop. de reciproka asekuro k. t. p.

## *Principoj de kooperativismo:*

*(daŭrigo sekvos).*



## LA JAPANAJ KURAC-KOOPERATIVOJ

Kiel en ĉiuj aliaj landoj, same en Japanio la kreskanta kapitalisma mastrumad-sistemo dividas la popolon en du sociajn partojn: „supran“ kaj „malsupran“. La tiel nomata „meza klaso“ multe perdis de sia iama signifo kaj droniĝis en la malsupran klason.

La registaro, maltrankviligita pro la jarpost-jara multiĝo de faloj (bankrotoj) de la meza klaso,

venis — per diversaj esploroj — al la konk-ludo, ke malsano, pli koncize dirite: la kuracpaĝoj al kuracistoj estis plej ofta kaŭzo de la kombatinda mizeriĝo kaj urĝis konstrui senpagajn hospitalojn, malsanulejojn kie oni kuracis je propraj kostoj kaj aliajn por-sanecajn instalaĵojn en ĉiuj urbegoj kaj urboj de la lando. Tamen — la urbetoj kaj vilaĝoj restis sen prizorgo de la registaro.



Malgraŭ ke en Japanio nuntempe la nombro de kuracistoj ĉiam pli kaj pli kreskas (pro la ĉiujaraj plurmil diplomitaj absolventoj de la medicinaj fakultatoj ĉe la japanaj universitatoj) — la nombro de vilaĝoj aŭ urbetoj, en kiuj mankas kuracisto, kreskas ĉiam pli, kiel tion montras la jenaj ciferoj:

Jaro	La nombro de kuracistoj en la lando
1927	47.110
1930	48.804
1932	50.068

Jaro	Nombro de vilaĝoj kaj urbetoj sen kuracisto
1923	1960
1927	2909
1930	3231
1934	3527
1935	3243

(Rimarko: la lasta cifero montras, ke la klopodo de registaro — dislokigi kuracistojn en senkuracistajn vilaĝojn — komencis efiki).

Pro kio naskiĝis tiu-ĉi ironia fenomeno? Jen la plej ĉefaj kaŭzoj de ĝi:

1. malriĉiĝo de vilaĝoj pro la tutlanda ekonomia krizo,
2. evoluo de trafiko, ebliganta la alveturon al la urboj,
3. evoluo de moderna kuracarto en la direkto de: a) specialiĝo, b) bezono de multaj kaj multekostaj kuracaparatoj kiel ekz. Roentgen, sunradia, diaterma kaj similaj, c) neceso de senĉesa plistudo pri medicino pro la rapida evoluo de la medicina arto.

Estas do facile kompreni, kial moderna kuracisto ne povas malfermi sian praktikejon en vilaĝoj aŭ urbetoj, sed nepre devas restadi en monabundaj urbegoj. Nur la kuracistoj, kiuj ne posedas memfidon je venko ĉe la konkurenco, restas vole nevole en iu angula distrikto kaj kuracas ĉiuspecajn malsanojn sen elekto (ĉar ili tuj devus bankrote forkuri de la loko, se ili konsciencie akceptus nur malsanulojn el sia specialeco). Krome — evoluo de la trafiko rabis al la vilaĝaj „ĉiopovaj“ kuracistoj la riĉajn malsanulojn, kiuj preferas elspezi pli da mono por specialisto. Samtempe multiĝas la nepagado de honorario al kuracistoj vilaĝaj pro la malriĉeco de loĝantaro. Tiel kreskas mizero sur mizero. Kiam do iu el la malnovaj „ĉiopovaj“ kuracistoj mortas aŭ forlasas sian vilaĝon, neniu kuracisto emas anstataŭi lin kaj ekloĝi en la vilaĝo, eĉ se la vilaĝano logas lin per bonegaj kondiĉoj. Tiamaniere la nombro de jam proverbiaj „vilaĝoj senkuracistaj“ kreskas ĉiam pli.

En tiaj cirkonstancoj, en Aprilo de la jaro 1922, la vilaĝkooperativo en Hunaho, Okajama gubernio, malfermis la unua kuracan sektion, por forigi al siaj membroj la maltrankvilon pro man-

ko de kuracisto. De tiu jaro ĝis la jaro 1928 — ok aliaj vilaĝkooperativoj dungis kuraciston por la sama celo. Tiuj kuracejoj estis tre simplaj, konsistante el unu aŭ du kuracistoj kaj unu fleĝistino.

Ĝi estis la unua periodo en la historio de la kurac-kooperativoj en Japanio, kiun oni povas nomi la periodo de dependaj kurac-kooperativoj, ĉar ili ekzistis nur ĉe iu alispeca kooperativo.

En la jaro 1928 estis fondita la unua memadministra kurac-kooperativo en la urbo Aomori. Ni aŭskultu la parolon de S-ro Akamoto-Masaĉi, iniciatinto kaj estro de tiu ĉi organizaĵo:

„Kial ni intencis komenci kuracadon laŭ kooperativa sistemo?“

Post la eŭropa mondmilito — la ekonomia vivo de l'mondo stagnacis, financa situacio ĝisfunde rigidis, ĉiuspecaj industriaj komercbranĉoj pli kaj pli malvigligis; proporcie al la ĉiujara profundigo de stagneco multiĝis ankaŭ la nombro de senlaboruloj kaj bankrotuloj; precipe tamen la sufero de vilaĝanoj atingis sian kulminaciopunkton kaj la etkomercistoj suferas pro elĉerpiĝo de fortoj.

En tia socia cirkonstanco ni sentas neforigeblan timon kaj maltrankvilon pro tio, ke ni ne povos tuj ricevi la necesan kuracadon, kiam subita malsano kaptos nin, nur pro nia financa mizero. Precipe korŝira estas la kazo, kiam ni, ne povante helpi, estas devigitaj rigardi, kiel unu el niaj familianoj ĝemadas en malsanulolito, kaj suferas batalante inter vivo kaj morto. De homama vidpunkto ni ne povas elteni, ke tia malbeninda okazo ekzistu en la civiliza tempo de la Syowa Epoko\*). Pro tio ni intencis, per unuiĝo de la loĝantoj, apartenantaj al la meza kaj malsupra klaso, laŭ kooperativa leĝo, organizi almenaŭ en Aomori kaj la najbara distrikto kurac-helpon, konstrui hospitalon, inviti talentajn kuracistojn kaj ebligi al la loĝantaro malkaran kuracadon. Tiamaniere ni povos defendi nin kontraŭ la menciita mizera okazaĵo, alporti al la homoj iom pli feliĉan vivon kaj efektiviĝadi la idealon de „interhelpe kaj kunprospero“

Pro simila motivo kaj por similaj celoj fondiĝis en la sekvinta jaro du pluaj sendependaj kurac-kooperativoj: unu — la Syowa Hospitalo, administrata de Karyo Riyo Kooperativo kaj Hatiozi Hospitalo — interhela kurac-kooperativo.

Kiel vi vidos el la sekvonta statistiko, ĉiujare aperis imitintoj, baraktantaj senescepte kun la malica baragado de la Japana Kuracista Ligo, kies membroj tamen estis devigitaj — sub premo de kurac — kooperativoj — malaltagi la kurac-takson malgraŭ sia volo kaj ankaŭ ŝanĝi sian sintenon rilate al la pacientoj.

\*) Syowa Epoko (elparolu Soŭa) signifas la regadepokon de la Imperiestro, laŭ kiu oni en Japanio kalkulas la jarojn (rimarko de la redakcio).



Kooperativa Hospitalo Syowa

Kaj nun — ni turnu nian atenton al la fondprospekto de la Tokia Kurac-Kooperativo, la plej tipa tiuspeca kooperero en Japanio, fondita dank' al klopodoj de S-ro Kagawa-Toyohiko kaj Nishitobe-Inazoo en la jaro 1932. Ili instalis grandan hospitalon, por savi la mezklasan loĝantaron el la subpremo de troa kurac-pago en Tokio — la ĉefurbo — kie troviĝas multaj komplete provizitaj hospitaloj por riĉuloj kaj bonaj kurac-organizaĵoj por la plej malriĉa loĝantaro.

„Estas tre stranga socia fenomeno, ke nur riĉuloj aŭ kompletaj mizeruloj povas sufiĉe kuracis. Gi estas bedaŭrindaĵo laŭ vidpunkto de socia justeco aŭ de vidpunkto de nacia saneco, okazanta malgraŭ ke la medicino en nia lando evoluis jam ĝis nivelo samgrada al ĉiuj antaŭevoluintaj landoj.

La ĉi-tie preparata koopera hospitalo intencas anstataŭi la jam menciitan malfavoran sistemon de kurac-organizo, kaj funkcii kiel interhelpa organizo de la kooperanoj laŭ nova ekonomia principo, kun la kredo ke: „kurac-arto estas homa arto“ Ni celas fari instalaĵojn por kuracado kaj sanigo laŭ koopera ekonomio, dungi konfidindajn kuracistojn, flegistinojn, akuŝistinojn kaj helpi al la kooperanoj gardi higienan vivmanieron. Ni esperas, ke laŭ nia koopera metodo ni sukcesos dungi kuracistojn de ĉiuj speciaĵoj, trankviligante per tio la membrojn por la okazo de subita malsaniĝo, kiu ĉiam minacas nian ĉiutagan vivon.

Kooperativa kuracejo havas ankoraŭ alian valoron — ĝi solvas facile ekonomian problemon, nesolveblan per aparta kuracisto, nome ĝi ebligas al specialistoj de diversaj branĉoj kunlabori ĉe la kuracado de unu persono, starigi sintezan diaĝnozaron (ekkonon de malsano), povas ĝisfunde kaj konsciencie klopodi por profilaktigo de malsanuloj, kio ja estas unu el fundamentaj taskoj de medicino“.

Nun mi montru al vi la statistikon de la laŭjara plimultiĝo de la japanaj kurac-kooperativoj:

Jaro	Numero de fonditaj kurac-kooperativoj
I. Periodo	
1922	3
1927	1
II. Periodo	
1928	3
1929	4
1930	6
1931	4
III. Periodo	
1932	12
1933	69
1934	28
1935 (ĝis Aprilo)	5
	136

Entute 136 kooperativoj, el kiuj 9 estas tute memstaraj, krom la Federacio de kurac-kooperativoj, dume aliaj dependas organize pli aŭ malpli de la aliaj kooperativoj, kiuj ilin kreis..

Ĉiu el la memstaraj kooperativoj grupigis ĉirkaŭ si 2 ĝis 3 mil da anoj. Ili pruntis monon por sia ekfunkciigo el la Centra Kaso de Kooperativoj aŭ de aliaj bankoj, konstruis modernan hospitalon kun multekostaj kurac-instalaĵoj kaj multaj kurac-ĉambroj, dungis plurajn kuracistojn kaj flegistinojn kaj — kompreneble — organizis en la hospitalo almenaŭ tri ĉefajn fakojn: de internaj malsanoj, de ginekologio (virin-kuracado) kaj de kirurgio; laŭ cirkonstancoj en la koncerna distrikto estas aranĝataj ankaŭ aliaj kurac-fakoj. Ĉiuj-ĉi hospitaloj malaltigis senescepte la kurac-pagon kompare kun la ĝis nun praktikataj.

Laŭ enketo, farita en la jaro 1933, la ĉefaj ciferoj rilate al la stato de kurac-kooperativoj en Japanio estas jenaj:

1. Membroj en la kurac-kooperativoj	19.399
2. Investa sumo (valoro de konstruaĵoj kaj internaj aranĝoj)	1,111.215 jenoj
3. Numero de kuracistoj en la kurac-kooperativoj	138
4. Numero de utiligantoj dum la jaro 1933	1,026.925 personoj
5. Pago por utiligo de la kooperativoj dum la jaro 1933	859.284 jenoj

Rimarko: La subaj ciferoj rilatas nur la memstarajn kooperativojn. La geografian dislokigon de la kooperativoj montras la apuda, speciale por tiu artikolo farita land-karto.

Mi skizis plej ĝenerale la ĉefajn trajtojn de nia kurac-kooperativa movado kaj ĝian nunan staton en Japanio. Tamen mi devas substreki, ke tiu movado apenaŭ nun komenciĝas en nia lando, kaj ke ni staras ĉe la sojlo de la tria, pli prospera periodo. Estas vero, ke multaj kooperativaj malsukcesis finance en sia dua periodo

### JUNULARA PAGO:

## POR INTERNACIA INTERKONSENTO DE KOOPERATIVA JUNULARO

En kooperativa gazetaro jam ofte estis pritraktita la problemo de junularo en koop. movado. „Estas ĝenerale konate, ke ia ajn socia movado havas antaŭ si des pli certan estonton, ju pli forte ĝi influigas la junularon“ — diris W. P. Watkins en sia interesa artikolo pri junularo (en Nr. 10 de la „Internacia Kooperativa Revuo“ de la jaro 1929). La maljuna generacio rapide alproksimiĝas al la tombo — kiu anstataŭos ĝin? Kaj oni devas ankaŭ memori, ke la kontraŭuloj ne dormas kaj ankaŭ kalkulas je akiro de junularo por si.

En la apartaj landoj oni jam faris kaj faras diversajn paŝojn rilate al favorigo de junularo por kooperativa movado. Sed la sciigoj, kiujn ni posedas pri tiu temo, estas tre malegalaj, precipe tre malnovaj. La lasta internacia enketo, kiun pri tiu temo presis la Internacia Oficejo de Laboro en sia periodaĵo „Kooperativaj Informoj“, devenas de la jaroj 1929-31, indikante ciferojn de ankoraŭ pli pasintaj jaroj. Laŭ tiuj informoj — la kooperativa movado inter la junularo — precipe la lerneja — prezentigis en la diversaj landoj jene:

**LATVIO:** Ĉirkaŭ 200 lernejskooperativoj, liverantaj al la lernantoj librojn, lernejsmaterialojn, akceptantaj ŝparaĵojn de lernantoj. La varon ili prenas de la eldon-kooperativo „Kulturas Balls“ kaj de aliaj kooperativoj de plenkreskuloj. La Centra Asocio de kooperativoj gvidas apartan sektion de lernantara kooperatismo.

**LITOVIO:** Ĉirkaŭ 20 koop. de lernantoj kun agado simila al la latva, kun jara spezo de 150.000 litoj. Ili konsistigas apartan sektion de la Litova Grand-Vendejo.

**HUNGARIO:** Lernantinoj de virina lernejo en Budapeŝto formas grupojn 8 — 10 anan kaj gvidas laŭ kooperativa metodo administradon de la lernejo.

kaj nun suferas pro siaj eraroj. La nunan periodon oni nomas „periodon de kooperaj hospitaloj“.

Mi esperas, ke baldaŭ mi havos okazon pli precize priskribi ĉiujn detalojn de tiu hospitala sistemo, kiu montriĝas tre fruktodona.

*Sikadi Matumoto*

oficisto ĉe la Syowa Hospitalo,  
Susaki Mati, Kōti Ken, Japanio.

**ĈEĤOSLOVAKIO:** La lernantoj fabrikas ludilojn, meblojn, trikotaĵojn, kulturaj ĝardenetojn, aĉetas kune ŝuojn, ekzercas librobindadon, bildokadrigon — ja eĉ strat-reparadon. Ili klopodas pri revivigo de popola arta hejms-industrio kaj fine — aranĝas koncertojn, teatro-prezentadojn, ekskursojn ktp.

**BULGARIO:** En la urbo Svihtov estas gvidata ampleksa komerca kooperativo de lernantoj, destinanta sian surpluson por instalaĵoj de la lernejo, por kiu ĝi aĉetas instruilojn, lernolibrojn ktp. Tiu kooperativo administras ankaŭ 4 manĝejoj en la urbo kun tagmanĝoj 40% pli malkaraj ol alie. Alia kooperativo „Probuda“ („Vekiĝo“) aĉetis el propra profito de teatraj prezentadoj 1000 seĝojn por sia lernejo kaj instalas tie tutan elektran instalaĵon. Ĝi ankaŭ havas propran sanigejon kun propra kuracisto, apoteko, ambulatorio, operaciejo kts. Memkompreneble — ke organizo de someraj restadejoj kaj libertempkuracejoj apartenas ankaŭ al unu el ĝiaj ĉefaj taskoj.

**ITALIO:** La informo de Intern. Labor-Oficejo mencias nur pri du labor-kooperativoj en lernejoj de Romo kaj Collestrada, gvidataj laŭ modelo de kooperativoj de laboro de plenkreskuloj.

**RUMANIO:** Laŭinforme ekzistas tie ĉ. 100 lernejskooperativoj, pri kiuj zorgas speciala Asocio, organizita sub protekto de Ministerio de klerigo. Pli detalajn informojn ni bedaŭrinde ne havas.

**MEKSIKO:** Absolventoj de teknikaj lernejoj fondis kooperativojn, kiuj fieras pro sia teknika, meblista, ŝlosista, elektroteknika ktp. produktado ĝis tia grado, ke ĉe ili trovas okupon ne nur la absolventoj, sed ankaŭ la iamaj profesoroj.

**OKCIDENTA AFRIKO:** En Kameruno — konforme al bezonoj de la lando kaj klimato, la lernantoj produktas en siaj kooperativoj meblojn, korbojn, teksaĵojn, tornistajn kaj forĝistajn produktojn, krom tio ili ankaŭ kulturigas ĝardenojn, sanig-herbarojn kaj korto-birdaron.

**UNIO de S. S. R.:** Antaŭ 14 jaroj ekzistis tie laŭdire 50.000 lernejs-kooperativoj, kun butikoj, metiejoj, teatro-grupoj kts. En Ukrainio en 86% de lernejoj estis organizitaj koop., kaj la Centra Eldon-Societo Koop. „Knyhospiłka“ eldonis eĉ specialan lernolibron por ili. Ĉar de post tiu tempo okazis en la lando de Sovetoj grandegaj ŝanĝoj, ni ne scias, kiel statas tie la afero nun.

**USONO:** Tiu lando estas patrujo de agrikulturaj lernejs-kooperativoj kaj unuiĝoj de eks-lerneja junularo, kontraŭe al Eŭropo, kie la komerca produkta tipo estas la pli ofta. Ili nomiĝas „Klubo de Laboro“ (Club-Works) kaj enhavas ĉiujn branĉojn de hejma kaj agrikultura mastrumado. Ekzistas do kluboj por kulturado de korta birdado, de porkoj, de plantado de maizo kts., al kiuj apartenas dekmiloj da junularo. En la stato Oregon eĉ studentoj de superaj agrikulturaj lernejoj partoprenas al ili, praktikante tie la akiritan agrikulturan scienccon.

**GRANDA BRITIO:** En Anglio mem ne ekzistas lernejs-kooperativoj de komerca tipo; ekzistas nur kelkloke — laŭ/amerika modelo — „Klubo de junaj farmistoj“ Sed en Brita Indio disvastiĝas lernejs-kooperativoj de kredo, de komerco kaj metio. Pro la malriĉeco de loĝantaro la lernantoj alportas sian membro-kotizon en natur-produktoj kiel fungoj, mielo kts. Tiu labor-metodo transiras ankaŭ en mez-kaj altlernejoj.

\*

Landoj kun plej granda nombro de kooperativoj de lernantaro sur la eŭropa kontinento — esceptante la neprecizitan Ruslandon — estas Francio kaj Polio.

En POLIO ekzistas nun pli ol 5000 lernejs-kooperativoj. La plimulto el ili estas koop.-butikoj kaj ŝpar-kooperativoj, sed ekzistas ankaŭ multo da metiaj kooperativoj kiel de librobindado, frizado, ktp.; tre ofte tia kooperativo alprenas en sian labor-programon ankaŭ la organizon de societa vivo de la junularo, ekz. ekskursoj, sportoj, meminstruo kts. Ili havas ankaŭ sufiĉe riĉan propran literaturon, indikitan en la Aldono al la plej fama tiuspeca libro de Jan Wolŝki „Ĉu ĝi estas nur Fabelo“, eldonita antaŭ ne longe en lingvo Esperanto. Antaŭ kelkaj monatoj aperis ankaŭ la dua, multe plilarĝigita eldono de la *Lernolibro* por kooperativoj de lernantaro, verkita de la direktoro de Kooperativa Mezs-lernejo en Varsovio, S-ro Franc. Dąbrowski (291 paĝoj). Laŭ nia scio ĝi estas — krom ukraina — la dua lernolibro tiuspeca en la tutmonda koop. literaturo. En Aprilo 1936 la Asocio de Konsum-

kooperativoj de Pollando komencis la eldonon de speciala monat-organo por la kooperativoj de lernantaro sub la titolo „Młody Spółdzielca“ („Juna Kooperatisto“).

**FRANCIO:** Lando pionira rilate al kooperativoj de lernantaro, organizitaj sur tute aliaj principoj ol en ceteraj landoj. Ili tendencas al produktado kaj koop.-laboro. Ilia ĉefa celo estas: pliiĝi la fondojn de lernejo por aĉeto de instruiloj, instalaĵoj, desegnado de lernejs-bildoj, landkarto, modeloj ktp., poste administrado de lerneja mastrumo, plantado de arboj kaj floroj, kulturado de kurac-herboj, protekto de bestoj, helpo ĉe memlernado, organizo de teatro-prezentadoj kts. Ili disvastiĝis precipe en provinco, malpli en urboj. Karakteriza trajto de ilia koop.-politiko estas, ke ili ne dividas la surpluson inter la membroj, sed destinas ĉion por sociaj celoj. Ĝi do estas la plej pura formo de kooperativa mastrumado. Aperas jam du organoj: „Copain-Coop“ („Kolego-Kooperatisto“) kaj „Arc-en Ciel“ („Cielarko“) en franca lingvo.

Kompare kun akiraĵoj de plenkreska generacio — nature la lernejs-kooperativoj ne prezas ian pli seriozan ekonomian valoron, ni devas pritrakti ilin pli de socia-eduka vidpunkto. Sed por komenco — ĝi estas jam ĝojiga fenomeno. Ni tre bedaŭras, ke mankas pli novaj informoj. Tial ni estus al la ŝatataj legantoj tre dankemaj, se ili povus liveri al ni pli detalajn informojn pri la nuna stato de koop.-movado inter la lerneja junularo en sia lando.

Plej ĉefa afero konsistas en tio, ke ĝis nun mankas ia centrejo de tiu internacia interkonsento de koop.-junularo de la diversaj landoj. La plenkreskuloj havas sian „Aliancon“ en Londono, same la Virinoj la Junularo ĝin ne havas. Pardonu — ĝi havas ĝin — sed en la romano „Ĉu ĝi estas nur fabelo?“ kaj tie en la fantazio de la aŭtoro, ĝi faras verajn miraklojn de internacia kunlaboro. Temas nun pri tio, ke ĝi fariĝu vera realeco, ne nur fantazio de l'aŭtoro...

Ni ne pretendas esti iniciatantoj de tia Asocio. Ni nur deziras, ke dank'al helpo de la internacia koop. gazeto la junularo de la diversaj landoj kolektu materialon, necesan al organizo de tiu Asocio por homoj, kiuj sentus fortojn por fondi ĝin. Se oni volas organizi, oni devas antaŭe scii, kio jam ekzistas sur tiu kampo. Ni ne dubas, ke la plenkreska generacio helpos al ni kolekti la necesan materialon.

„Kion Johancjo ne lernis, tion Johano certe ne ellernos“ — diras pola proverbo. Se do ni deziras, ke la estonto apartenu al kooperativistoj, ni devas organizi la junularon laŭ principoj de kunlaboro jam de post la plej junaj jaroj.

Karol Haubold

redaktoro de „Młody Spółdzielca“  
(Juna Kooperatisto), Warszawa, Grażyny 13.  
Pollando.

# Tutmonda Kooperativa Kroniko

## ANGLIO:

*Nova kooperativa fabriko de mebloj.* En Redcliff apud Manĉestero estis malfermata nova, laŭvice la sesa meblo-fabriko de la Pogranda Asocio de Kooperativoj (C.W.S.) Ĝi posedas plej novteknikan maŝinaron, kiun neniam privata firmao en Anglio ĝis nun posedas. La vendsumo de mebloj el la fabrikoj de tiu Asocio pliiĝas en la lastaj 5 jaroj.

*Novaj kooperativaj filmoj:* La Pogranda Asocio en Manchester eldonis antaŭ nelonge novan kolorigitan filmon kooperativan, en kiu la ĉefpersono estas malgranda servisto de hotelo, konata el propagandafiŝoj. Ĝis nun ekzistas tiaj filmoj pri: fabrikado de konservoj, de ŝapo, kaj oni nun preparas, kvin novajn: pri vestaĵfabrikoj, elektraĵoj, lakto kaj viando-komercado kooperativa.

## BRITA INDIO:

*Kooperativa Instituto.* La Konstanta Tutindia Federacio de Indiaj Kooperativaj Institutoj kaj la Asocio de Provincaj Koop-Bankoj decidis kune la kreon de Centra Instituto por Kooperativaj Studoj. Oni decidis turni sin por financa helpo al la Konsilantaro de Agrikulturaj Kooperativaj Studoj kaj al la Universitatoj por helpo intelekta por aranĝo de kooperativaj prelegoj en la hindaj universitatoj.

## AUSTRALIO:

*Kooperativa buter-produktado en Okcidenta Australio.* Malgraŭ la malpliiĝo de lakto-produktado en la lando, la kooperativaj laktejoj plimultigas ĉiam pli kaj plisian produktadon. En la jaro 1935 la tuta produktado atingis 5,368.050 funtojn da butero.

*Koop. vendo de lano en Nova Suda Walio (New South Wales)* La Koop. Societo de Farmistoj en N.S.W. vendis la plejmulton de lano el inter ĉiuj similaj entreprenoj en la lando, nome 199.155 da pakoj. La sama Societo vendas ankaŭ brutaron (1 kaj duono da milioj da virŝafoj kaj 126 mil da bovoj en la lasta raportjaro).

*Kooperativo de taksistoj:* La en la jaro 1928 fondita kooperativo de taksistoj posedas nun 130 proprajn veturilojn kaj 10 proprajn telegraf-liniojn, efektivigante ĉiusemajne 10.000 da mendoj per telefonaj. Ĝi liveras al siaj membroj benzinon, oleon kaj ceterajn artikolojn, necesajn ĉe uzado de automobiloj. Ĉiuj veturiloj kaj ŝoforoj de tiu kooperativo estas facile rekoneblaj pro la uniforma koloro kaj vestaĵo.

## ĈEĤOSLOVAKIO:

*3-jara evolu-plano de la germanaj kooperativoj en Ĉeĥoslovakio.* La Konsilantaro de Germanaj Kooperativoj en Ĉeĥoslovakio akceptis 3-jaran laborplanon, kies plej ĉefaj punktoj estas jenaj: Pliigi la nombron de membroj je 20.000, la spezojn je 30 milionoj da ĉ. kronoj, je 20 milionoj la spezojn de la Pogranda Asocio, je 10 milionoj la koop-produktadon. La eldonnombro de la populara kooperativa gazeto „Genossenschaftliches Familienblatt“ (Koop. Familia Gazeto) devas altiĝi de 158 ĝis 240 mil da ekzempleroj.

*Nova imposta leĝo:* La ĉeĥoslovaka parlamento akceptis novan leĝaron pri impostoj, en kiu estis reformita ankaŭ la sistemo de impostoj en kooperativaj entreprenoj. Laŭ tiu leĝo oni distingas kooperativojn de recip-proka helpo, agantaj precipe nur inter membroj, kaj kooperativoj komercaj, agantaj ankaŭ inter nemembroj. La unuaj pagas impostojn ne de la akirita profito, sed de la fonda kapitalo (2 ĝis 4%). La komercaj kooperativoj pagas imposton 1 ĝis 4% de la profito depende de la profit-sumo (komence de 20 mil ĝis pli ol 100 mil).

## FINNLANDO:

1. *Centra Kooperativa Bakejo.* La Centra Asocio de neŭtralaj kooperativoj en Finnlando „Suomen Ossu-skauppojen Keskuskunta“ (S.O.K.) alpaŝis al konstruo

de centra bakejo, kiu liveros panon kaj aliajn bakaĵojn al siaj kooperativoj. La novaĵo de tiu organizo konsistas en tio, ke ĝis nun ĉie, en ĉiuj landoj, bakejoj estis starigataj de la lokaj kooperativoj, dume tie ĉi faras tion anstataŭ ili ilia Centro. Montrigis, ke la apartaj kooperativoj ne ĉiam havas monon kaj fortojn por konstrui propran bakejon, kaj pro tio la membroj estis devigitaj aĉeti panon kaj kaj bulkon en privataj entreprenoj. Nun ankaŭ tiu malfacilaĵo estis forigita. Oni intencas konstrui similajn bakejojn ankaŭ en la provinco. Ke tiu bakejo estos la plej moderna, en 6-etaĝa konstruaĵo, apud la ĝisnuna muelejo de la Centra Asocio, estas detaloj sciindaj, parte memkompreneblaj.

## FRANCIO:

*Partopreno de kooperativistoj en la ŝtataj ekonomiaj organizoj.* Laŭ la lasta ekonomia leĝaro eniris — en la Statan Komisionon de Kontrolo de Prezoj reprezentanto de la Tutlanda Federacio de Konsum-kooperativoj de Francio (S-ro Cleuet), same la Federacio havas siajn reprezentantojn en la Franca Banko, ŝtata Gren-Oficejo, kaj en la Miksita Komisiono por organizo kaj kontrolo de la karba merkato.

*La leĝo de Chanal (legu Sanal).* La ĉambro de Deputitoj (parlamento) voĉdonis la t. n. leĝon de Chanal, laŭ kiu estos permesate krei miksitajn kooperativojn de agrikulturaj produktantoj kaj de konsumantoj. Ĝi antaŭvidas la financon helpon flanke de l'ŝtato en la sumo de 4 milionoj frankoj. La centraj kooperativaj instancoj penas plialtigi tiun sumon, necesan al ekfunkciigo de tiaj kooperativoj.

## SVISLANDO::

*Parlamenta Kooperativa Rondo.* En la tutlanda Federacia Parlamento 40 deputitoj organizis Kooperativan Rondon, por defendi la kooperativan movadon kontraŭ atakoj de privata-komercaj reprezentantoj en la sama parlamento.

*Kooperativaj filmoj.* La Asocio de Svisaj Konsum-kooperativoj pretigis 4 novajn kooper. filmojn: „Kafo“ — pri la bruligado kaj pakado de kafo, pri aliaj artikoloj de la Koop-Fabrikoj, Pri ŝuo-fabrikoj de la Asocio kaj la kvara propagand-kleriga sub la titolo: Pioniroj, kun speciala muzika akompano, verkita de unu Lausanna komponisto: La filmoj havas tekston francan kaj germanan kaj estas disponeblaj por kooperativoj, kiuj havas aŭ povas lui filmaparaton.

*Aparato por sekigo de greno.* La Asocio de Agrikulturaj Kooperativoj en Winterthur aĉetis en Svedio plej novan eltrovaĵon el la agrikultura maŝintekniko — nome aparaton por sekigo de grenoj. Tiu aparato ne nur sekigas, sed purigas grenojn jam ŝimitajn tiel perfekte, ke oni ne povas distingi ilin de tute nova.

## USONO:

*Progreso de kooperativoj de kredito.* La ĝis la lastaj jaroj tro individueca Ameriko komencas ĉiam pli kaj pli ekkoni la valoron de kooperado ne nur en agrikulturo, sed ankaŭ en kredit-sistemo. Nur en la jaro 1909 komenciĝis la fondigo de kredit-kooperativoj en Usono, kaj jen ili estas jam hodiaŭ ĉirkaŭ 3000, kaj deposit la federala leĝo pri kredit-kooperativoj, voĉdonita en la jaro 1934, la nombro de anoj en ili kreskas ĉiumonate je 10.000. La plejparto de ŝparantoj konsistas el fabrik-laboristoj, koop-vendistoj kts. Kiel efika montriĝis la supre nomita leĝo, evidentiĝas el la fakto, ke dum malpli ol unu jaro post ĝia voĉdono 77600 personoj ŝparis la sumon de 1,306.000 dolaroj. Speciala enketo inter la ŝparantoj montris, ke 85% de la ŝparantoj neniam antaŭe havis ian ajn konton en la banko, nek ŝparis iel-ajn alimaniere. Okazas ofte ankaŭ komuna ŝparado de 50 aŭ pli personoj, kiuj ĉiumonate ŝparas certan sumon kune por iliaj komunaj celoj.

(daŭrigo sekvas).

Resumo el „Spółdzielczy Przegląd Naukowy“ (Scienc-kooperativa Revuo).

# RECENZOJ

JOHN MAYNARD KEYNES, *The General Theory of Employment, Interest, and Money* (la Ĝenerala Teorio pri Dungado, Procentaĵo, kaj Mono), McMillan, London; Harcourt, Brace, & Co, New York City.

Laŭ ĉiuj ŝajnaĵoj, la kooperanaro ĝisnune ne scias, kia por ĝi valora libro pri ekonomio aperis en komenco de la jaro 1936. Dum 20 jaroj John Maynard Keynes instruis pri la „classical economics“ (klasika ekonomio) en la Universitato de Cambridge, Anglujo. Ofte li malkonsentis kun siaj kolegoj, kaj liaj libroj prezentis vidpunkton ofte nomitan „ne ortodoksa“. Sed ĉiam Prof. Keynes restis inter la fideluloj al la ekonomio de David Ricardo kaj liaj sekvantoj.

Fine -- S-ro. Keynes „ribeliĝis“ — en 403 — paĝa verko, ŝargita de pezaj argumentoj pri la centraj punktoj de sia sistemo.

„La konsumado — ripetante evidentajn — estas la sola celo kaj objekto de ĉiu ekonomia agado“, li skribas, kaj pruvas, ke ekonomio, bazita sur produktado kaj asertanta, ke la konsumado kaj aĉet-povo poros sinteni, estas principe erara.

S-ro. G. D. H. Cole, ankaŭ unuaranga ekonomiisto, skribis en la „New Statesman and Nation“, ke tiu-ĉi verko devas esti konsiderata kiel „la plej grava teoria ekonomia skribajo depost la „Kapitalo“ de Marx, aŭ — se nur klasika ekonomio estas konsiderata — kiel komparebla kun la „Principoj“ de Ricardo“

Efektive — jen libro studinda de ĉiuj kooperanoj, kiuj interesas sin pri ekonomiaj problemoj. Ankaŭ libro tradukinda, kaj diskutinda en la tuta mondo.

*John Lewis Kiplinger.*

**TADEUSZ KLAPKOWSKI:** *Spoleczeństwo w rozwoju historycznym* (La homa socio en sia historia evoluo). Eldono de „Spółnota Pracy“, Varsovio 1935, paĝoj 384, form. 17 × 25½.

Juna pola sociologo kaj samtempe aŭtoro de multaj kooperativaj libroj, rilatantaj teorion kaj historion de tiu movado en Pollando, eldonis la unuan, enkondukan volumon al sia sistemo. Ĝi dividiĝas en 3 ĉefajn partojn, nomitajn en la verko „libroj“. Libro unua traktas pri evoluo historia de homa socio ĝenerale kaj evoluo de ĝia kulturo. Libro dua — pri la faktoroj de historia kaj kultura evoluo, libro tria — pri la esenco de la historia kaj kultura evoluo. Kapitroj de la unua parto tekstas: I. Historia skizo, II. Evoluo de politika kaj socia strukturo, II. Ekonomia evoluo. En la dua parto: I. Naturo, II. Ekonomio, III. Civilizacio, IV. Religio, V. Psihologio, etiko, politiko, pedagogio, VI. Estetiko. En la tria: I. Solidareca histori — kaj kulturkoncepto. II. La leĝoj de historia kaj kultura evoluo. III. La celo de historia kaj kultura evoluo, IV. Rigardo al estonta historia kaj kultura evoluo. Detala laŭnoma kaj laŭtema indekso faciligas la serĉadon de faktoj en tiu abundega minejo de sociaj faktoj kaj fenomenoj.

Ni ne povas en tiu mallonga recenzo eniri sciencajn kritikojn de la verko, sed — menciante pri ĝia enhavo, ni volas nur rimarki kelkajn ĉefajn trajtojn de ĝia gvidpensado: „Solidarecon“ de homa socio la aŭtoro komprenas ne en la t. n. „etburĝa“ senco de la francaj „solidaristoj“, predikantaj unuecon de interesoj de kapitalisto kaj laboristo, sed en senco multe pli larĝa, nome en senco de interdependeco de homoj kaj homaj grupoj, komunumoj kaj ŝtatoj unu de la alia. Kiel faktoron de evoluo li rigardas ĉefe la fenomenon de kunagado de grupoj en diversaj epokoj, per kio li pareniĝas kun la historia koncepto de Petro Kropotkin, tiel majstre skizita en lia mondfama verko „Interhelpo“ kiun S-ro T. K. multfoje citas. Ke tiu elirpunkto gvidas la leganton al agnosko de nuntempa kooperativa movado kiel unu el plej konsciaj aperaĵoj de tiu „solidareco“, oni povas konjekti, kvankam la aŭtoro en tiu unua volumo tute tiun movadon ne tuŝas, destinate specialan volumon por ĝi en pluj serioj.

VOLG (Verband Ostschweizerischer Landwirtschaftlicher Genossenschaften), Winterthur: Festschrift zum fünfzigjährigen Bestehen, verfasst von Dr. Ernst Durtschi.

(VOLG — Asocio de la Orientsvisaj Agrikulturaj Kooperativoj en Winterthur, Jubilea Libro okaze de la 50-jara ekzisto, redaktis Dr. E. Durtschi).

Paĝ. VIII + 385 + 3 sp — en lingvo germana.

Tiu-ĉi impcna volumo, presita sur bela senligna papero, ornamita per multaj ilustraĵoj, prezentas al la leganto la historion kaj nunan ŝtaton de la plej granda kaj plej malnova Asocio kooperativa de agrikulturistoj, havanta sian sidejon en la urbeto Winterthur apud Zŭrich, kaj enhavas jenajn ĉapitrojn:

I. Fondo kaj disvastigo de agrikulturaj kooperativoj en Svislando, II. Mallonga historio de VOLG (komencaj literoj de la titolo de la Asocio), III. Konstrua historio de la Asocio kaj de la Asocio-kooperativoj, IV. Evoluo de la Asocio (detala laŭ grupoj kaj komerc-produktoj) kaj de la societoj, V. Rilato al la regionaj organizoj, al aliaj ekonomiaj organizoj kaj al la ŝtato, partopreno en ili, VI. La ekonomia kaj socia signifo de VOLG.

El tiu larĝa enhavo ni eltiras la plej ĉefajn sciindaĵojn, nome: La Asocio komencis sian agadon en la jaro 1888 kiel malgranda distrikta organizo de vilaĝanoj, grupiganta kelkajn societojn por komuna aĉeto de artifa sterko. En la unua jaro estis tiamaniere organizitaj nur 16 societoj, poste tiu nombro pliiĝis al 122 en 1900, 162 en 1910, 226 en 1920, 275 en 1930 kaj 314 en la jaro 1935, kun 25 mil da membroj. Simile proporcie plialtiĝis la spezo de tiu Asocio, nome: en la jaro 1888 nur 0,3 milionoj da svisaj francoj, en 1902 — 3,7 milionoj, 1922 — 21,4 milionoj, 1935 jam 37,9 milionoj.

Ĉiuj asociitaj agrikulturaj kooperativoj havas la devon, aĉeti la varojn necesajn nur ĉe la Asocio, liveri al ĝi unue siajn produktojn vendeblajn, esti per la Asocio ĉiujare reviziitaj. El la organizitaj societoj 230 okupiĝas pri vendado de artikoloj de hejma bezono al la vilaĝanoj kaj gvidas tiucele 400 vendejojn.

Por bone priservi la ĉiam pligrandigantajn bezonojn de la asociitaj kooperativoj, la Centrejo konstruis krom sia ĉefa ejo en Winterthur — 5 grandajn magazenojn, vin-kelaron por 1,5 milionoj da litroj kun modernaj ferment-arangoj, maŝinaron por fabrikado de senalkohola frukto-kaj ber-suko, modernan sekigilaron por fruktoj, legomoj ktp., malvarmigilejojn por freŝa mang-fruktaro, plenaŭtomatajn muelejojn por bakista farino kaj prilaboro de paŝtaro, unu gren-„siloson“ (grenmagazonon) por 80 fervojevagonoj da greno, mekanikan metiejon, laborpretan fabrikan por produktado de teknikaj grasaĵoj, grandegan ŝarĝ-automobilon kun aliaj vagonoj, person-automobiloj, veturigoj kts.

La Asocio okupas konstante ĉ. 300-nombran laboristkaj oficistaron, kiu havas propran maljunul-kason kaj aliajn asekurajn arangojn.

La unuaj fondintoj de tiu Asocio estis: Conrad Schenkel, Jakob Schräml kaj Heinrich Abt. Hodiaŭ ĝin gvidas la Sinjoroj: Dir. Emil Schwarz, Karl Wunderli, Caspar Späni kaj Dr. Ernst Durtschi (legu Durĉi). La originaleco de tiu Asocio konsistas precipe en tio, ke ĝi organizas ne nur la vendadon de agrikulturaj produktoj, sed ankaŭ la konsumadon agrikulturan, per kio ĝi renkontiĝas en sia agado kun la Svisa Asocio de Konsum-kooperativoj, havanta sian sidejon en Basel, liverante al tiu lasta la produktojn agrikulturajn kaj prenante de ĝi varojn industriajn por siaj vilaĝanaj kooperativoj.

Interesatoj pri detaloj povas turni sin al la Asocio sub la adreso: Verband Ostschweizerischer landwirtschaftlicher Genossenschaften, Winterthur, Svislando (en lingvo germana aŭ franca), aŭ pere de nia Redakcio en Esperanto.

J. Z.

*Rimarko de la Redakcio:* Nia usona kunlaboranto alsendis al ni la suban liston. Ni plenkontente presigas ĝin, petante la kooperativanojn de aliaj landoj kolekti similajn sciigojn pri originala kooperativa literaturo de ilia lando, por ke ni, paŝo post paŝo, liveru al niaj legantoj la tuton de la plej ĉefaj originalaj verkoj de ĉiuj landoj. (Bv. ne forgesi la eldoniston kaj nombron de paĝoj).

*Dr. J. P. Warbasse* „*Cooperative Democracy*“ (Kooperativa Demokratio). Nova eldono de internacie konata verko de la prezidanto de la Cooperative League of the U.S.A. (Koop. Ligo de Usono).

*Bertram Fowler* „*Consumer Cooperation in America*“ (Konsum-Koop. en A.) Populara, iom ĵurnalista resumo de la nuna stato de la movado en Usono.

*Marquis W. Childs* „*Sweden, the Middle Way*“ (Svedio — la meza vojo). Bonega studo de la sveda ekonomio, kun unu valorplena ĉapitro pri Danujo. Oni diras ke la legado de ĉi-tiu libro interesiĝis Prezidanton Roosevelt pri la kooperokaj la „miksita“ — duonpublika, duonprivata — posed-sistemo kaj ekonomio.

*Upton Sinclair* „*Cosmos*“ Romano kiu ne forgesseble pentras la krizon en la usona vivo. Produkta kooperado estas la temo de la libro, sed la aŭtoro elvolvas argumenton por la konsum-kooperado el sia rakonto. La loko de l'agado estas California.

*C. L. U. S. A.* „*The Cooperative League Year Book 1936*“ (Jarlibro de la Koop. Ligo de Usono). Kvankam nomita jarlibro, ĉi tiu eldonaĵo sekvas la laste aperintan „*Year Book*“, de 1932. Historio de la C. I. U. S. A. verkita de la

prezidanto, Dro. J. P. Warbasse, estas la ĉefa ĝenerala artikolo en la verko. Plej interesa estas la pruvo, ke la farmaj organizoj turnas sin al Rochdale'a, konsumakooopero.

*Burriss Jenkins* „*Fresh Furrow*“ (Nova sulko). Koopera romano.

*Horace M. Kallen* „*The Decline and Rise of the Consumer*“ (La falo kaj leviĝo de konsumanto). Historia kaj filozofa studo de la movado, alte estimata ĉe la kooperaj idealistoj.

*Harlan Randall and Cley Daggett* „*Consumers' Cooperative Adventures*“ (Okazintaĵoj de Konsum-Kooperativo). Ampleksa lernolibro, enhavanta apartajn studojn pri diversaj tipoj de kooperoj. La aŭtoroj estas instruistoj en normal-lernejo en Whitewater, Wisconsin.

*Frederic Howe* „*Denmark, the Cooperative Way*“ (Danio, la vojo de Kooperado). Aperinte je la fino de 1936, ĉi tiu libro estas simile informakiel la skandinava studo de Sro. Childs. Usona intereso pri la nordaj landoj kreskas kontinue.

*C. L. U. S. A.* „*How St. Francis Xavier University Educates for Action*“ (Kiel la Universitato de Sankta Francisko Ksavier edukas al agado). Kvankam nur broŝur-forma, ĉi tiu 51-paĝa verko egalvaloras al la plej gravaj libroj por la kooperanaro. Per ĝi oni informiĝas, kiel la pastroj de la malgranda lernejo je Antigonish, Nova Scotia, helpas konstrui la kooperon en ilia malriĉa, marborda regiono.  
*John Lewis Kiplinger*  
*W. Virginia.*

## DIVERSAĴOJ:

### AL LA RUBRIKO: „KIEL NI DEVAS NOMI NIN?“

En la lasta Nr. de „*Cielarka Standardo*“ la redakcio tuŝis la aferon de la ĝusta nomo por nia movado. La aŭtoro hezitas, kiun radikon alpreni: kooper', kooperac' ĉu kooperat' aŭ kooperativ'.

Mi tamen asertas, ke neniu el tiuj kvar, ĉar la vorto verdire ne estas tute internacia kiel ekz.: matematiko, fiziko aŭ radio. Nur en la romanidaj kaj en kelkaj germanidaj lingvoj ĝi estas simila, dume en lingvo germana, ĉeĥa, pola, rusa kaj ĉiuj slavaj kaj ĉiuj ceteraj en Eŭropo kaj Azio oni uzas propran nacian vorton, ekz.: germane — Genossenschaft, ĉeĥe — družstvo, polle — spółdzielnia, serbo-kroate — zadruga, ktp.

Do — ĉu ankaŭ Esperanto ne povus krei propran, pure esperantan vorton por tiu celo? Jes — nature — ĝi povas kaj devas. Sed kiun? La

plej proksima — laŭvorta „kunagado“ havas tro ĝeneralan sencon. Oni devas do precizigi tiun sencon en kadroj de tiu organizaĵo, kiu estas konata deŝt 90 jaroj en Eŭropo sub la nomo „koopera-tiv-a“. Kia estas la esenco de tiu organizo? — La socia kunagado. Mi do prononas la novvorton: k u n s o c i a d o. Kaj nun la postulataj derivaĵoj:

1. pura ideo — kunsociado; 2. organizo — kunsociaĵo; 3. la anoj de tiu organizo — kunsociaĵanoj, 4. simpatiantoj de la movado — kunsociemuloj, 5. specialistoj, propagandistoj kts. — kunsociadistoj, 6. laboristoj praktikaj — kunsociaĵistoj k. t. s.

Nature oni povas krei multajn aliajn derivaĵojn: kunsociigi, kunsociigisto, kunsociejo ktp.

Kiu havas proponon pli bonan? *A. U.*

# ALSENDITAJ LIBROJ KAJ BROŝUROJ

- (kontinuo el la Nr. 2/3, kie ili ne estis numeritaj).
20. Hungara Generala Kreditbanko, Budapest, V, József-tér, 2. Reklamprospekto.
  21. Budapest, la metropolo de sanigbanejoj (Reklamfolio) Adr: Centra Komitato de la Termalbanejoj kaj resanigejoj en Budapest, V, Vigado-Placo 3 Hungario.
  22. La samo en pola lingvo.
  23. La Suède Coopérative, par Anders Hedberg (Kooperativa Svedlando), 98 paĝoj. Plej nova monografio pri la sveda kooperativa movado en franca lingvo. Kiam tiaj gravaj libroj aperos en vere internacia lingvo Esperanto?
  24. K. Pomijański: Zielarstwo Uspolecznione (Sociigita Kurac-herba Komerco) Eldono de nia Eldon-Kooperativo „Spółnota Pracy“ en kunlaboro kun la Kurac-Herba Kooperativo de Pollando, pri kiu estis artikolo en la Nr. 2/3 de „Cielarko“. Ĝi pritraktas la neceson de kooperativigo de kurac-herba komerco en Pollando, estanta nun en manoj de spekulaciistoj. (36 paĝoj, prezo 1 zł).
  25. The C. W. S. at Home and Abroad (La Pograndasocio de Anglaj Kooperativoj — en-kaj eksterlande) 32 paĝoj; belege ilustritaj, Adr: Manchester, 1 Baloon Street (CWS).
  26. Hispanujo — Alvoko al la Pacifismo, de H. Runham Brown, Hon. Sekretario de Militrezistantoj, 11 Abbey Road, Enfield, Middlesex, England. 12 paĝ.
  27. Welsh Agricultural Organisation Society Ltd., Report for the year 1935 (Jara Raporto de la Walesia Agrikultura Koop. Asocio), Adr: Aberystwyth, Anglio.
  28. La Komencanto (Lernolibro de Esperanto) de G. P. de Bruin, Eldono de la Federacio de Laboristaj Esperantistoj en Nederlando, Postbus W 6, Amsterdam. 146 paĝ., prezo 0,90 florenoj. Detala, preciza lernolibro laŭ gramatika metodo, por nederlandlingvaj laboristoj.
  29. Libervola Civila Helpservo Internacia, 6 Klaraweg, Bern, Svislando. 16 paĝ. Sub la devizo „Fosilo anstataŭ pafilo“ tiu Asocio celas anstataŭigi la milit-servon per civila labor-servo volontula.
  30. Coöperatief Leven en Streven (Kooperativa vivo kaj celado) 130 paĝ. Agadraporto kaj statistiko de la Federacio de Katolikaj Kooperativoj en Ne-

derlando (Adr. Federatie der Diocessane Bonden van Katholieke Kooperatieve Vereenigen), Drift 8, Utrecht, Nederlando.

31. Unua Libro de Stenografia Instituto Tutmonda (sistemo Duploye-Flageul), 9, Bd. Voltaire, Issy-les-Moulineaux, Seine, Francio. Monografio de tiu sistemo kaj ĝia movado. kun fotoj.
32. James Guillaume: Mihail Bakunin, 1814—1876 1936 (biografio), tradukita el franca en rumanan lingvon de Ion Ionescu Capatina, Eld. Umanitatea Bucuresti V. str. Dr. Istrati 10 a, Rumanio.

---

LA Nr. 2-3 de „CIELARKA STANDARDO“ enhavis jenajn artikolojn (sur 20 paĝoj): Nia ĝisnuna rikolto; Petoj, konsiloj, proponoj; Jubilea Esperanto-Kongreso; Nobla donaco; Konferenco de Internacia Kooperativa Alianco en Varsovio — kun foto; El la malferma parolado de S-ro Vaino Tanner, (Prezidanto de la supre nomita Alianco) dum la dirita Konferenco. Kooperatismo ĉe la nunjara Universala Kongreso de Esperanto en Vieno. Citaĵoj el la unua kooperativa gazeto „The Cooperator“ de la jaro 1828-30 (de Dr. William King), Historio de (agrikultura) movado kooperativa en Islando (kun fotoj); Al la rubriko: La ĝisnuna apliko de Esperanto en kooperativa movado; Kelkaj vortoj pri la Brita „Kooperativa Esperanto-Ligo“. La kooperativa societo „Solidar“ en Malmö (kun fotoj); Iom pri la kooperativa movado en Nederlando (kun fotoj); Kooperativa Kurac-herba komerco en Pollando; Tutmonda kooperativa kroniko; Bibliografio; Libroj alsenditaj; Ricevitaj gazetoj; Diversaĵoj (Kiel ni devas nomi nin — kooperativ an oĵ. Anoncoj kaj Abonkondiĉoj.

---

Pro manko de loko ni estis devigitaj — krom tre valoraj artikoloj el Svedio kaj Nederlando transmeti en sekvontan numeron la Liston de ALSENDITAJ GAZETOJ kaj la LISTON DE NIAJ KUNLABORANTOJ, kiujn ni petas, alsendi sian FOTON por poste kuni publikigo.

---

Pro ŝanĝo de presejo k. a. kaŭzoj teknikaj tiu-ĉi Nro aperas malfruigita, pro kio ni petas pardonon niajn ŝatajn Legantojn. La sekvonta Nro. por Januaro-Februaro aperos fine de Februaro 1937.

---

## ANONCOJ

SCIENCA KOOPERATIVA INSTITUTO  
(Spółdzielczy Instytut Naukowy)

Warszawa (Varsovio), str. Warecka 11 a. Pollando, estas la centrejo de sciencaj kooperativaj esploroj kaj liveras al interesatoj ĉiujn informojn pri pollanda kooperativa movado kaj ĝiaj problemoj. Korespondas krom ĉiuj slavaj en lingvoj: angla, franca, germana kaj esperanta. Eld-

onas monatan revuon „Spółdzielczy Przegląd Naukowy“ (Scienca Kooperativa Revuo) kaj Bibliotekon de l'Instituto, ĝis nun 29 volumoj. Katalogoj senpage.

---

Cu jam vi aĉetis por vi kaj viaj infanoj la unuan kooperativan romanon en Esperanto — la ĉarmoplenan libron de Jan Wolski „Cu ĝi estas nur fabelo?“  
Prezo 4 sv. fr. aŭ egalvaloro. Ricevebla en nia redakcio.

---

ELDONANTO: Eldon-kooperativo „Spółnota Pracy“ Warszawa (Varsovio), ul. Marszałkowska 149/9. Pollando.  
Cef — kaj respondeca redaktoro: Johano Zawada. „Cielarka Standardo“, aperas monate.

---

ABONO: 7 sv. fr. jare, en Pollando 6 złoty. Mondaĵoj estu direktataj al la ĉek-konto de „Spółnota Pracy“ Nr. 17381 en la Pola Poŝt-Sparkaso Varsovio (P.K.O.) Oni akceptas ankaŭ kvaronjarian abonon. Aparta N-ro 0,70 sv. fr.

---

PREZO DE ANONCOJ: 1 paĝo: 150 sv. fr. ½ paĝo: 80 sv. fr., ¼ paĝo: 45 sv. fr., ⅛ — 25 sv. fr., — aŭ egalvaloro. Malgrandaj anoncoj: 0,50 sv. fr. linio.

---

Zakłady Graficzno-Introligatorskie J. DZIEWULSKI, Warszawa, Senatorska 10

